

Pola Esperantisto

XXXI
JARO

AUGUSTO — SEPTEMBRO
1937

Esperantysta
Polski

ELDONANTO WYDAWCA POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO
REDAKTANTOJ PROF. DR ODO BUJWID — MGR TAD. HODAKOWSKI
REDAKTORZY

APERAS LA 20-an DE CIU MONATO. REDAKCIAN MATERIALON ONI PETAS SENDI ĜIS LA 10-a DE
CIU MONATO. LA REDAKCIO ESTAS RAJTIGITA LAŬ BEZONO SANGI LA TEKSTON DE MANUSKRIPTOJ.

JUBILEA KONGRESO DE ESPERANTO

Warszawa 7—14 Aŭgusto 1937.

La Jubilea Kongreso okazis.

Kiel tia konstato en la komenco de prikongresa raporto? Ĉu in dubis, ke la Kongreso okazos? Ĉu estis iaj malhelpoj? Ĉu eble la Esperantistaro tulumonda ne volis veni al la urbo, kie vivis kaj laboris nia Majstro, al la lando, kiu donis al la mondo Zamenhofon kaj liajn unuajn plej fidelajn adeptojn kaj disĉiplojn Grabowski, Belmont, Zakrzewski?

Hodiaŭ, kiam ni povas feliĉe komenci nian raporton per la konstato, ke la Jubilea ne nur okazis, sed ankaŭ brile pasis, ni rajtas ankaŭ malkaŝi al la Esperantistaro, ke grava danĝero minacis la Kongreson, ke vere giganta kaj nemezureble nervostreĉa, fortorabanta estis la laboro de pola Esperantistaro kaj de la Loka Kongresa Komitato en Varsovio, kiuj faris ĉion por ebligi al la Esperantista popolo la festadon de nia duonjarcenta jubileo.

Unufoje en la historio de la Esperanto-movado ekestis malhelpoj por okazigo de nia tradicia ĉiujara festo, malhelpoj ne kaŭzitaĵ de ekstere.

Pola registaro favore rilatis al la ideo okazigi la Kongreson en Polujo. La regna

prezidanto, prof. dro Mościcki, akceptis la altan protekton de la Kongreso. La tuta registaro formis honoran komitaton. Gravaj enlandaj organizadoj, kiel la Stata Blindulinstituto, la centraj kooperativaj unuigoj de Polujo ktp. subtenis kaj apogis la Kongreson.

Tiuj neesperantistaj aŭtoritatoj komprenis, ke la Esperantistaro devas la nunjaran Kongreson okazigi speciale solene pro la Jubileo kaj ke tiu Jubilea Kongreso povas kaj devas okazi nur en la patrujo de la lingvo kaj de ĝia kreinto.

Bedaŭrinde iom alie aspektis la afero sur la interne Esperantista kampo. Post la lastjara Universala Esperanto-Kongreso en Vieno la Esperantistaro kun miro eksciis pri grava skismo en la Esperanto-organizo. Oni eksciis, ke la gvidantaro de Universala Esperanto-Asocio foriris de ĝi, fondante novan centron sub la nomo Internacia Esperanto-Ligo laŭ decido, akceptita dum nepublika kunveno en la Kongreso, pri kiu la kongresanoj ne estis informitaj. Oni eksciis iom poste, ke aliflanke restariĝis en Genevo la Universala Esperanto-Asocio, estrata de provizora komitato. Poste venadis al la ĉiam pli mi-

rantaj Esperantistoj voĉoj de reciprokaj kulpigoj, ekflamis polemiko, ekvigligis la fultoj de la Esperantaj gvidantoj por kontraŭbatali „internajn malamikojn“. Bolanta energio de bravaj, malnovaj, elpruvitaj gvidantoj estis sencele forzata por klarigoj, ĝustigoj, demandoj, respondoj kaj — eĉ insultoj. Pri la ekstera mondo, la mondo esperantigota, la mondo, rigardanta nin ankoraŭ hodiaŭ grandparte kun sufcia suspekto, malfido kaj eĉ multfoje kun kompata rideto, oni ŝajne tute forgesis.

Intertempe Pollanda Esperanto-Delegitaro kaj la Loka Kongresa Komitato en Varsovio komencis la preparajn paŝojn por organizi la Jubilean Kongreson konforme al antaŭe fiksitaj decidoj, respondantaj al la ĝenerala deziro de la Esperantistaro.

Kaj jen ekestis la unuaj malhelpoj. Kvankam la nomo de niaj kongresoj estas tradicie kaj dokumente fiksita „Un i v e r s a La Kongreso de Esperanto“ komenciĝis batalo ĉirkaŭ la kongreso. Estis faritaj provoj, ke la Kongreso estu nur kongreso de unu el la du rivalantaj organizaĵoj. Pollanda Esperanto-Delegitaro kaj L.K.K. ricevadis leterojn, tuj infoje estis ne nur ne samideanaj, sed impresis kvazaŭ milit-deklaroj. Venadis ultimataj postuloj, venadis minacoj, venadis demandoj, venadis kulpigoj, venadis hontigaj supozoj, ke L.K.K. verŝajne kaŝe servas la interesojn de la „alia“ flanko.

P.E.D. kaj L.K.K. estis sieĝataj, estis bombardataj, estis timigataj.

Sed Pollandaj Esperantistoj ne ektimis, ne genufleksis, ne cedis al malpravaj postuloj. Ili konsciis, ke la sorto de la Esperanta movado dependas en tiu momento de ilia sinteno. Ili komprenis, ke cedi al unu el la du kvazaŭaj partioj — egale al kiu — signifus enterigon de la Kongreso kaj ĝisfundan kompromiton de la Esperanta movado antaŭ la ekstera mondo.

Speciala „Komisiono por Internaciaj Problemoj“, elektita tiucele, post zorga studo de la situacio proponis al P.E.D. kaj al L.K.K. la sole eblan eliron: la Jubilea estos same kiel ĉiuj ĝisnunaj kongresoj UNIVERSALA KONGRESO de ĉiuj Esperantistoj, sendepende de tio, ĉu kaj al kiu Esperanta organizaĵo ili apartenas. La Kongreson do aranĝas L.K.K. memstare kaj lasas al ambaŭ organizaĵoj la plenan liberecon okazigi dum la Kongreso siajn laborkunsidojn. Malferma kaj ferma kunsidoj, jubileaj aranĝoj (solenajoj sur la tombejoj de Zamenhof kaj Grabowski kaj festo de veteranoj) kaj — ĉu ni ridu aŭ

ploru? — la internacia balo kaj teatra prezentado estos komunaj kaj ne dispartigitaj laŭ HEL- kaj UEA-aparteneco, simpatio aŭ inklino.

L.K.K. komencis trakti kun ambaŭ „partioj“, ke ili akceptu tiun solvon. Aparte venis al Varsovio la reprezentantoj de ambaŭ imagitaj potencoj. Ili subskribis kun L.K.K. „Interkonsentojn“ ebligante al ĝi preparon de la Kongreso.

Tamen per tio ne finiĝis la dorovojo de la organizaĵoj. Unu organizaĵo tuj konfirmis la subskribon de sia reprezentanto, la alia — organizis voĉdonadon, ĉu ĝi akceptu la „Interkonsenton“ aŭ ĉu „estu organizata Kongreso aliloke, jam plene subigita al tiu organizaĵo. La Esperantista popolo ankaŭ tiomomente bone faris sian ekzamenon kaj ne hontigis sin antaŭ la historio. La landaj asocioj ne nur respondis jese al la demando pri konfirmo de plena neŭtraleco de la Kongreso, sed eĉ kelkaj el ili — kaj ĝuste la plej grandaj kaj gravaj tuj informis la L.K.K. ke — kia ajn estos la rezulto de voĉdono, — ili ĉiuforte helpos la sukcesigon de la Kongreso en Varsovio.

Do, la Esperantista popolo klare diris sian vorton. Sed, dame la L.K.K. devis atendi kun tremo kaj maltrankvila necertece la verdikton de la gvidantoj, des pli, ke unu el ili eĉ skribis al L.K.K. en la nomo de sia organizaĵo, ke tiu decidis **nenion** enpresi en sia gazeto pri la Kongreso ĝis la afero klarigos. Por klarigo ni aldonu, ke la gazeto, proklaminta kaŝan bojkoton de la Jubilea Kongreso, ne estis idista aŭ kontraŭbatalanta nian movadon, sed Esperanta. Ni notas la fakton nur por montri, al kio kondukas troa politikemo kaj troa aŭtokratemo de homoj, kiuj estas tamen ankore bonaj Esperantistoj kaj kiuj deziras sukceson kaj progreson de Esperanto. Ni intence ne citas nomojn, ĉar ne temas pri personoj, sed pri agoj. Eraro farita ne kompromitas. El eraroj oni lernas la ĝustan vojon. Pri la tuta afero ni skribas nur por doni al la legantoj proksimuman bildon de egaj malfacilaĵoj, renkontitaj de L.K.K.

La plej bonaj monatoj foriris, vane perditaj por propagando kaj varbado. Fine oni sciigis al la malesperanta Komitato, ke la Esperantistaro jese decidis pri la Kongreso kaj ke la organizaĵo, estante demokrata, akceptas tiun decidon kaj helpas al la Kongreso. Estis vere jam preskaŭ tute malfrue, tamen la L.K.K. ekspiris pli libere kaj kun novaj fortoj daŭrigis sian laboron. Kaj tie-ĉi ni pro justeco diru, ke ĝuste la gvidanto, minacinta per

silento en sia organo kaj efektive dum certa tempo silentinta, post la decido multe helpis al L.K.K., organizinte grandan karavanon kaj varbinte multajn kongresanojn por ĝi.

Malmulte komence informata pri la Kongreso la Esperantistaro aliĝadis nur iom post iom. La aliĝoj gutadis. Ankaŭ tio malebligis racian organizon de la Kongreso.

Nur la lastaj monatoj Junio-Julio alportis veran torenton de aliĝoj. Nova laborego, novaj zorgoj, sed ankaŭ grandega ĝojo kaj konvinko, ke la Jubilea sukcesos, ke ne vanaj estis la klopodoj, ne sencelaj la faritaj fortostreĉoj, ke rekompencita per sukceso de komuna laboro estos la malagrablaj momentoj, travivitaj de la organizantoj.

Preskaŭ 1.100 kongresanoj, akiritaj en tiaj kondiĉoj kaj en la tempo, kiam grava nombre kaj kvalite parto de nia paca armeo — la germana gesamideanaro — brutece kaj senkompate estis elŝirita el niaj vicoj. — tio estis vera sukceso kaj evidenta pruvo de nia vivanteo.

Pruvo tiom necesa por ni mem sur la sojlo de la Jubileo. Pruvo, diranta al ni mem, ke nia movado vivos, eĉ se iaj eksteraj faktoroj estos kontraŭ kaj eĉ se iamomente tiuj aŭ aliaj niaj gvidantoj faros ian eraron.

Akcepto en Varsovo.

Flagoj de ĉiuj landoj kaj nia verda flago de Espero jam ĉe la stacidomo salutadis la Esperantistojn, venantajn al la Kongreso. Ili flirtis sur la peronoj kaj sur la stacidoma turo, tronanta super Marszałkowska strato kaj videbla de malproksime.

Ne nur flagoj salutadis la kongresanojn. Servemaj gejunuloj deĵoradis ĉe ĉiu alvenanta vagonaro kaj tuj forkondukadis la alvenantojn. Kaj jen bonega novaĵo, imitinda dum sekvontaj niaj Kongresoj: la Akceptejo, al kiu oni kondukis ĉiujn, troviĝis vidalvide de la stacidomo. Dum unu minuto oni povis atingi ĝin por ricevi siajn dokumentojn, renkonti ĝoje malnovajn konatojn kaj — plene enspiri la kongresan atmosferon.

Al la kutima enhavo de kongresa dokumentaro L.K.K. aldonis belan donacon por ĉiu kongresano: ampleksan „Oran Libron“, dediĉitan al la Jubileo de nia lingvo. Se ne la bedaŭrindaj antaŭaj malhelpoj, certe ankaŭ tiu libro aspektus multe pli bele kaj dece. La intenco de L.K.K. estis prezenti al la Esperantistaro plenan bilancon de nia komuna penado dum la

pasintaj kvindek jaroj. La „Ora Libro“ nur parte plenumis tiun taskon. Ĝi do servu kiel unua komenco kaj donu instigon al daŭrigo de tiu laboro en pli trankvilaj cirkonstancoj. Niaj historiistoj eklaboru...

Interkonatiga Vespero.

Sabate, la 7-an de Aŭgusto, postlagmeze en la Kongresejo kunsidis la L.K.K. kun la Internacia Porkongresa Komitato por preparoli la kongresajn aranĝojn.

La lertaj fotografistoj sukcesis eternigi la momenton de paca kunsido ĉe komuna tablo de reprezentantoj de „malamikaj“ partoj de nia movado. La fotoj kaŭzis sensacion kaj saĝnis esti bona antaŭsigno de venonta paco.

Vespere en ĝardeno de la kafejo „Bagatela“ okazis la kutima „Interkonatiga Vespero“. Regis gaja atmosfero, kiun inaŭguris lerte samideano mgr. Pruski, bonveniginta de la scenejo la Esperantistaron nome de L.K.K. kaj insiste petinta la gesamideanaron pri gajeco kaj vigleco. La vortoj efikis. Oni fervore interkonatigis, renovigadis malnovajn amikecojn kaj multe dancis. Eĉ la tro altaj prezoj, cetere fariĝintaj laste tradicio dum niaj interkonatigaj kongresaj vesperoj, efikis nur la poŝojn, sed neniel la humoron de la kongresano.

Malfermo de la Jubileo.

Dimanche matene okazis Esperantaj diservoj kun predikoj en katolika kaj protestanta preĝejoj. Aparta diservo estis aranĝita por blinduloj. La blinda pastro frato Angello celebris la meson kaj predikis en Esperanto.

Ĉiuj diservoj, okazintaj kun speciala permeso de la pola kardinalo Kakowski, kiun la prezidanto de PED prof. dr. Bujwid antaŭ la Kongreso informis pri la Esp. movado, estis bone vizititaj. Ankaŭ multaj neesperantistoj venis por ĉeesti tiujn diservojn por homoj diversnacaj, venkintaj la malbenon de diverslingveco.

Je 11-a horo matene belaj florkronoj estis metitaj nome de la Kongreso kaj de la blinduloj en palaco Belweder memore al la Marŝalo Piłsudski, al kiu Polujo ŝuldas sian renaskiĝon kaj liberecon.

Tagmeze en la granda salono de Filharmonio okazis la solena malfermo de la Jubileo. Plenplena estis la vastega ejo. Meze de la riĉe ornamita estrado vidiĝis busto de la Majstro inter floraro. Flagoj de ĉiuj landoj, reprezentitaj dum la Kongreso, pendis desupre, vigle atestante la vastan amplekson de nia movado. Unu ŝtata flago mankis tie, sed tiu manko estis muta

akuzo ne kontraŭ ni, sed kontraŭ tiuj, kiuj malpermesis nian grandan kulturalan movadon en tiu lando. Ĉiu el ni sciis, ke multaj, multegaj samideanoj en tiu lando pensas tiuonente pri ni kaj sopiras baldaŭ denove havi la eblecon kunlabori kun siaj fratoj de tutmondo.

La orkestro ekludas polan nacian himnon, post kio la prezidanto de L.K.K. s-ro B. B. Wszyński, vicedirektoro de la kabineto de trafikministro, malfermas la kongreson, bonvenigante ĉiuj ĝiajn partoprenantojn kaj dezirante sukceson al la Jubilea, kies devizo estas „Esperanto en la lernejojn“. Speciale li salutas ankaŭ la oficialajn reprezentantojn de diverslandaj registaroj.

Poste faras jubilean paroladon prof. dro Odo Bujwid, ovacie aplaŭdita de la tuta kongresanaro. Kun profunda sento kaj emocio prof. Bujwid parolas pri nia Majstro kaj sia kolego Dro Zamenhof, kies dornoplenan vojon kaj persistemon en laboro por la homaro li mallonge skizas. La noblaj ideoj de Zamenhof pri paco kaj amo inter nacioj venkos malgraŭ ĉio.

Longedaŭraj aplaŭdoj sekvas la vortojn de prof. Bujwid.

Per aklamado estas elektata jena prezidantaro: Prezidanto — prof. dro Odo Bujwid, vicprezidantoj: prez. de IEL gen. Bastien, prez. de UEA K. M. Liniger, konata sveda pioniro Paul Nylén, prof. dr. Hideo Yagi, viedir. min. B. B. Wszyński kaj prezidanto de UABO kapitano Silhan. Ĝenerala kongresa sekretario — Aleksander Hartman, sekretarioj — mgr. Cz. Pruski kaj f-ino Goldsmith.

Nun Julio Baghy en sia konata majstra maniero deklamas sian poemon, dediĉitan al la Jubilea:

La himnaj akordoj resonas en koro
Kaj lulas ĝin penso pri l'duonjarcent'.
La tempo agendas pri longa laboro,
Pri mil pioniroj, nul agoj de l'Sent'
Kaj tremas surlipoj pro l'ĝojo jubiloj
En urbo, de kie forflugis la vok'.
Al kin respondas nun voĉ' de centmiloj
Per lingvo mirakla de nova epok'.
Jen vidu, pilgrimo el ĉiu mondparto
Tutkoran saluton nun portis al vi
Kaj dankon pro viaj kompreno kaj varto,
Ho, pola popolo kaj urb' Varsovi'.
Ni venis kun pio, kun frataj deziroj
Jubili kun vi pro l'libero de l'ter'.
En kin ripozas la polaj martiroj,
En kin ekĝermis la flor' de l'Esp'.
Ni venis memori pri verva komenco
Kaj festi atingon de nia voĵmez'
Firmigi en kredo, en nobla intenco

Kaj marŝi plu brave laŭ jura promes'.
Ĝefratoj, kuraĝe do supren la koron
Kaj atlen la flagon por bela estont'.
La balto solena inspiru laboron
Por venko de l'Homo, por gloro de
[l'mond'.

Longe daŭras tondro de aplaŭdoj post fino de la deklamado. La kongresanaro estas entuziasmigita.

Post tio venas la salutparoladoj de la oficialaj reprezentantoj de registaroj kaj de aŭtoritatoj.

Pola registaro kaj pola ministroprezidanto estas oficiale reprezentitaj de vicministro dro Piestrzyński.

En la nomo de la urbestro de la ĉefurbo Varsovio salutis la kongreson direktoro Klemens Frelek.

Por la registaro de Aŭstrio parolis en Esperanto grafo Attems. La oficiala delegito de la registaro de Suda Aŭstralio legis en Esperanto salutleteron al la Kongreso de la ĉefministro. Por Belgujo salutis s-ino Jennen, por Bulgarujo s-roj Stojkov (ministerio de instruado) kaj Krestanoff (ministerio de komerco). Finnlandon reprezentis s-ro Vilho Setälä. Por la registaro de princlando Lichtenstein parolis s-ro Hans Jakob, por Nederlando s-ro ing. J. R. G. Isbrückér, por Norvegujo kapitano Bugge-Paulsen. La lasta en la vico estis la registara delegito de Papuo dro Williams, kies salutparolado vekis grandan sensacion kaj aplaŭdon.

Telegrafe salutis la kataluna registaro ankaŭ en Esperanto.

Post la registaraŭ sekvas esperantistaj salutparoladoj. Unua parolas prezidanto de IEL gen. Bastien, la dua — prov. prezidanto de UEA s-ro min. kons. K. M. Liniger. Sekvis en la nomo de IKUE pastro Rotondo, Skolta Ligo — s-ro Toczyski, UABO — prez. kapitano Silhan, TEKA — prez. dro W. Róbin kaj de Frateca Movado — s-ro Bodziechowski.

Poste venis longa vico de reprezentantoj de landaj Esp. asocioj. Estas notinde, ke preskaŭ ĉiuj en siaj mallongaj salutoj esprimis la deziron, ke la Esp. gvidantoj trovi vojon al repaĉigo kaj ĉesu la interbataladon. La vigla aplaŭdado en la salono estis bona pruvo, ke tiu deziro respegulas la veran deziron de la Esperantista popolo.

La ĝenerala sekretario s-ro Hartman mallonge informis la Kongreson pri granda aro da saluttelegramoj kaj leteroj, venintaj de ĉiuj flankoj de la mondo.

Ni komprenas, ke pro mallongeco de la tempo kaj multego da salutoj estis necble

legi aŭ eĉ citi ĉiujn. Tamen almenaŭ kelkajn de malnovaj, elpruvitaj samideanoj, malhelpitaj veni al la Kongreso, oni estus povinta tralegi.

Por korekti tiun mankon ni citu tie ĉi almenaŭ du leterojn: de Leo Belmont kaj de Edmond Privat.

Letero de Leo Belmont.

Gesamideanoj.

En fantazio mia vian alvenon atendis mi kvindek jarojn ĉe pola lulilo de l'Esperanto kaj inkluzive dudek jarojn apud la ŝtono tomba de l'Majstro.

Kaj vi alvenis ĝuste je limtempo — alvenis grizharuloj rejuniĝintaj kaj junuloj florantaj, knabinoj kaj virinoj bluokulaj kaj nigroharaj el diversaj landoj — alvenis ĉiuj multnombraj, fervoraj, entuziasmaj — fidelaj per kredo tradicia, aŭ fidelaj per nova sento al interna ideo de l'genio Zamenhofa: amo tutnacia, tuthomara.

Proksima al via Kongresejo per nemultaj paŝoj, sed iom malproksimigita per klopoda malsano, tamen plejproksima al Via aro per vigla spirito, mi preskaŭ haltis en destinita al ĉiu homo turniketo inter Vivo kaj Morto, — mi haltis por sendi al Vi mian benon veteranan, por deziri al Kongreso sukcesan laboron kaj por kuraĝe profeti, ke la Jubilea malfermos pordon por ni al nova epoko: al Esperanto konstante triumfanta sur supraĵoj registaraj kaj en profundaj animoj de la kultur-nacioj.

Vivu Esperanto!

Leo Belmont

Letero de dro Edmond Privat.

Kara prezidanto, melankolie mi mezuras la grandan distancon ĝis Varsovio kaj mia penso flugas al vi kaj ĉiuj amikoj speciale al la familio Zamenhof dum tiuj ĉi jubileaj tagoj.

Bonvolu transdoni al ĉiuj kaj al la tuta kongreso mian plej koran saluton kaj bondeziron. Vivu la nobla verko kaj ideo de Zamenhof! En suferanta Polujo ĝi naskiĝis, en reviviginta Polujo ĝi floru kaj kresku tra la tuta mondo!

Via fidela

Edmond Privat

P. S. Estas nenia profunda kaŭzo por malpaco inter Esperantistoj, Naciaj Societoj kaj UEA nur amike dividu siajn kom-

petentecojn. Se du urboj volus kongreson, ili ĝin havu unu jaron post alia, vice. Ni memoru, ke la kongreso estas de Zamenhof intencita kiel festo de lia ideo, ne nur de la lingvo. Tial ilian organizon devus premi en la manojn UEA, dum la Naciaj societoj devus organizi naciajn kaj propagandajn konferencojn.

Lingvaj organizaĵaj disputoj ĉiam suĉis la energion de la esperantistaro. Tuj kiam oni ĉesas tiajn ludojn por labori al la disvastigo de nia lingvo, la feliĉo kaj paco revenas.

Tion instruis nia longa sperto. Neniu pli bone ol vi, nobla kaj kaŝa amiko povas tion komprenigi al ĉiuj.

Benata estu via klopodo!

(Daŭrigo kaj fino de la kongresraporto en sekvonta No de „Pola Esp.“).

* * *

PAROLADO DE LA URBESTRO DE BIALYSTOK

la 11. 8. 1937 al la Esperantistoj dum la akcepto, aranĝita je ilia honoro.

Sinjoro urbestro S. Nowakowski faris jenan pollingvan paroladon, tradukitan Esperanten de s-ro J. Szapiro:

Estimataj gesinjoroj,

En la nomo de la urbeŝtaro mi havas la honoron saluti la partoprenantojn de la XXIX-a Jubilea Kongreso de Esperanto, kiuj bonvolis veni al Bialystok por viziti la naskurbon kaj naskolokon de Dro Ludoviko Zamenhof, la kreinto de la lingvo por ĉiuj nacioj.

Sendube kun emocio vi rigardadis hodiaŭ la modestan kaj malriĉan dometon, en kiu antaŭ jaroj naskiĝis la homo kaj la ideo, kinu vi ĉiuj sekvas.

Inspirataj per la nobla ideo de paca alproksimiĝo kaj kunvivado de popoloj, vi portas vian verdan standardon kaj la devizon de disvastigo de la lingvo Esperanta tra la tuta terglobo kaj inter ĉiuj civilizitaj popoloj.

Salutante vin mi deziras samtempe, ke la lingvo Esperanto plue sukcesu kaj floru kaj ke vi progresu en via scienca kaj kulturkleriga movado.

La tutmonda Esperantistaro, reprezentita de la ĉeestantaj tie ĉi delegitoj de ĉiuj nacioj kaj landoj vivu!

NIA URĜA LABOR'!

Kaj jen la Jubilea estas for! Kiam ni penas ekpercepti, ĉu ĝi plene efektiviĝis niujn esperojn, ni ekkomprenas, ke ne ĉio nin kontentigis. Ni sentas — dum hejmenveturo, ne espartrompon, sed bedaŭregon, ke ne okazis reunuiĝo inter IEL kaj UEA. Sed kiomforla estis ĉies deziro al kunfandiĝo, tio ne okazis. Ne estas mia celo debati pri tio, kies kulpo estas tio, mi volas nur konstati, ke tamen el intertraktado sekvis jam ne armistico, sed „pakto pri reciproka neatakado“. Karaj gesamideanoj! ni ankaŭ pro tio devas ĝoji. Imagu, ja nun ni ĉiuj estas ree soldatoj de nia verda armeo. Ne gravas ĉu IEL — oni nomos infanterio, kaj UEA — kavalerio, aŭ inverse, gravas tio, ke ni jam ne staras unu kontraŭ la alia, ke niaj ĉiuj klopodoj de nun estos sandirektaj. Sed ni devas ankaŭ memori, ke dum ni estas atakontaj la neesperantistan publikon, ni ankaŭ povas internan malamikon. Tiu kvazaŭmalamiko estas niaj rifuĝintoj, tiuj kiuj pro ilia hezitemo aŭ kontraŭemo, aŭ eĉ pro aliaj nekonataj miskauzoj ĝis nun aliĝis nek al IEL, nek al UEA. Ili senkulpiĝus certe per atendado de momento „ĝis kiam la afero pliklarigus“, sed tia metodo estas inda por neesperantistoj. Sed nun post la Jubilea kiam montriĝis klare, ke bazo por ilia atendado plua jam ne ekzistas, nun ĉiu konscia

esperantisto ne rajtas, se li pretendas tian nomon, resti ekster vicoj de unu el tiuj organizaĵoj. Se al iu esperantisto ne plaĉas ŝajna duvojeĉo de nia movado, li estu certa, ke la vivo iom post iom forigos ĝin aŭ kreos alian konvenan formon de organizo, do tiu ĉi stato estas provizora por nia movado.

Estas mirinde, ke ekzistas ankoraŭ esperantistoj, eĉ ĉial bonaj, kiuj kontestas bezonon de apartenado al la organizaĵoj. Ni klare devas kompreni kaj ekpercepti, ke nia esperantisteco surmetas sur nin certajn moralajn devojn, kies neobservado malutilas al ni en okuloj de ekstera mondo. Finfine ja irante dise, ni neniam atingos nian celon en nuna tempo de kolektivismo. Do niaj nunaj klopodoj, same de IEL kiel de UEA, estas envicigi tiujn hezitantajn, kiuj ne plu indu nomojn de rifuĝintoj. Por plirapidigi kaj akceli ilian reakiron koncernaj estraroj aŭ akceptu ilin por restanta parto de 1937 jaro por 50% kotizo, aŭ por antaŭpagita kotizo por 1938 konvene pligrandigita. Jam nun antaŭ nia nova laborsezono, kiu komenciĝas sub signalvoko „Esperanto en la lernejojn“ — ni konsolidigu niajn vicojn. Neniu postrestu.

Inĝ. M. Chmieleński
Toruń
ĉefdelegito de IEL.

SUFICE DA PASIVECO

Dum la lasta jarkunveno de P. E. D., okazinta en Varsovio la 13. VIII. 37 oni unuanime venis al konkludo, ke fruktodona gvidlaboro de P. E. D. sen sufiĉa monsumo ne estas ebla.

Konsekvence al ĉi tiu konkludo oni decidis komenci monkollektion inter bonvolemaj esperantistoj kaj esp. Societoj kaj ne ĉesi ĝin pli frue ĝis kiam estos kolektita sumo de 5.000 zł (kvin mil.), ĉar apenaŭ tiu sumo permesos al P. E. D. dungi el vico de spertaj, sed malcaciaj esperantistoj pagatan oficejon kaj postuli, de li sisteman (laŭ pli frue ellaborita plano) plenkonscian laboron.

Monkollektio jam estas komencita. Ĝis nun venis en kason de P. E. D. sumo 11 zł kaj ni atendas pluajn monoferojn, pagotajn al P. K. O. nr 411.404 poŝtĉekkonto de P. E. D. fondo „ kvin mil.“ — En „Pola

Esp.“ ni kvitancoj ĉium je ĉi tiu celo oferitan eĉ plej malgrandan sumon.

Post la funkciigo de pagata oficejo, P. E. D. povos fariĝi, vera centro de esp. vivo en Polujo. Tie ni povos pli, malpli precize ekscii kiom multaj ni estas en Polujo (dank' al gvidata statistiko), kiom da societoj ekzistas en Polujo, kiamaniere oni povas legalizi novan societon, de kie kaj je kiaj kondiĉoj oni povas venigi esp. prelegantan k. t. p., k. t. p.

Larĝa kaj respondeca estos laborkampo de la dungota oficejo.

Pripensu ĉi tion, plenumu vian devon kaj estu bona ekzemplo por aliaj, kiujn vi instigos al monafero.

Se ĝis fino de kuranta jaro ĉiu esperantisto en Polujo oferos nur po 1 zł. — P. E. D. povos funkciigi, preparolatan oficejon jam de la nova jaro.

Mgr Czesław Pruski.

INTERŜTATA ESPERANTO-AKORDO

Rezolucio de dro Antoni Czubyński 10 VIII. 1937 dum la kunsido de TAGE akceptita dum plena kunsido la 14 VIII. 1937 de XXIX Un. Kongreso.

La kunvenintoj dum la kunsido de TAGE dum XXIX Universala Esperanto Kongreso en Varŝavo decidis renovigi la klopodojn koncernantajn la realigon de Interŝtata Esperanto Akordo (IEAk) celanta la samtempan enkondukon de Esperanto kiel devigan lernoobjekton en ĉiujn lernejojn de la mondo, se 6 ŝtatoj la samon promesos.

Por tiu ĉi celo oni decidis:

inter esperantistoj:

1) organizati interkonsente kun Landaj Asocioj la Landajn Komitatojn por Realigo de tiu ĉi IEAk.

2) popularigi pere de ili prese kaj prelege la ideon pri IEAk inter rondoj esp. inter neesperantistoj;

3) plebiscito inter neesperantistoj por IEAk per varbado de fakaj asocioj, korporacioj, societoj ktp. neesperantaj en ĉiuj landoj parte aŭ entute por tiu ĉi ideo, ke ili subtenu la celadojn de esperantistoj ĉe iliaj propraj registaroj pri IEAk.

4) varbado de politikaj partioj, grupoj, blokaj ktp., ke ili enmetu en sian programon la postulon al iliaj registaroj subteni tiun ĉi ideon.

5) vasta propagando en ĉiu lando de la ideo en larĝaj amasoj, kolektado de la rezolucioj kaj petskriboj de diversaj pli konataj homoj favoraj al tiu ĉi ideo.

6) varbado de la deputitoj en parlamentoj (eventuale kantonoj, ŝtatoj en Usono ktp. laŭ landaj kondiĉoj).

7) prezentado de la ideo pri IEAk al ministroj de klerigo kaj ekstero (laŭ landaj kondiĉoj) kun la peto, ke la koncerna lando aligu al IEAk.

Postuloj pedagogiaj:

Preparo de la instruistoj kaj ilia diplomigo, verkado de necesaj lernolibroj kaj legolibroj, vortaroj.

Postuloj organizaj:

La kunvenintoj de la XXIX kongreso de TAGE decidis dum tiu ĉi kunveno por bona aranĝo de preparaj laboroj peti ĉiujn redakciojn de naciaj esp. ĵurnaloj kaj revuoj malfermi la kolonojn por la presado de la sciigoj kaj cirkuleroj pri IEAk en la periodo komenca antaŭ la konsolidiĝo de la komitatoj por realigo kaj eventuale antaŭ speciala organo dediĉita al IEAk movado, kiu devas esti sendependa kaj libera de la disputoj inter UEA kaj IEL.

Rezolucio de TAGE pri la enkonduko de esperanto en la lernejojn proponita dum la ferma kunsido 14 VIII 1937 de la Jubilea Kongreso kaj ĉiuvoĉe akceptita de la Kongreso.

Konsiderante unue, ke la solvo de la problemo de unu helpa lingvo internacia en la epoko de la aviado, de la radio kaj de la filmo sonora por ĉiuj internaciaj rilatoj estas ĉiam pli kaj pli urĝa, kiel interalie pravas la lasttempa propono de senatano Macartney Abbott, aprobita de la aŭstralia federacia senatano, pri la kunvoko de speciala Interŝtata Konferenco:

konsiderante due, ke la sola praktika solvo de tiu ĉi problemo, kiu jam grandparte fakte aŭtomate efektiviĝas, estas ne nur laŭ la kompetentaj lingvistoj, sed ankaŭ laŭ la raportoj de la sekretarioj de la Ligo de Nacioj de 1922, la artefarita lingvo Esperanto, kreita en 1887 de pola kuracisto dro Ludoviko Lazaro Zamenhof, lingvo, kiu de la simpla projekto dum apenaŭ duonjarcento fariĝis granda socia movado, laŭ kultura vidpunkto kaj vere neŭtrala helpa lingvo vivanta, uzata en ĉiuj landoj de miloj kaj miloj de laŭvolaj adeptoj por diversaj sciencaj, profesiaj, ideoj, politikaj, religiaj kaj aliaj celoj, tiel politike neŭtrala, teknike perfekta, faciliga rimedo de la interkompreniĝo inter la popoloj de ĉiuj kontinentoj:

konsiderante trie, ke la literaturo kaj la gazetaro en tiu ĉi lingvo ĉiam pliriĝas kaj servas al ĉiuj celoj, ke samtempe la teknika vortaro ĉiuflanke ellaborita estas jam pli riĉa ol en multaj eŭropaj lingvoj;

konsiderante kvare, ke esperanto donas lingvan egalrajtecon al ĉiuj nacioj en la internaciaj traktadoj;

konsiderante kvine, ke en multaj internaciaj organizaĵoj (institutoj, kongresoj, oficejoj, foiroj) eĉ en oficialaj, kiel Internacia Oficejo de Laboro, — Esperanto fariĝis jam fakte en uzado laŭvice kvara aŭ kvina internacia lingvo apud la franca, la angla, la hispana kaj la germana, ĉiam kiel lingvo preferata de la larĝaj amasoj kaj plej korekte uzata el ĉiuj lingvoj;

konsiderante sesse, ke en multaj landoj ekzistas jam pli aŭ malpli grandaj kadroj de instruistoj necesaj por instrui la lingvon en la lernejoj;

konsiderante sepe, ke en la landoj, kie la nombro de instruistoj ne sufiĉas, oni aplikas sukcese lasttempe la rektan meto-

don de pastro Ĉe. laŭ kiu instruas la lingvon fremdaj instruistoj;

konserante oke, ke en multaj lernejoj la lingvo estas instruata ne nur fakultative, sed devige kaj ke eĉ la plej malriĉa infano povas lerni ĝin;

konserante naŭc, ke multaj ŝtatoj helpas kaj subvencias tiun ĉi instruadon, rekonante la grandan signifon, kiun esperanto povas havi el la vidpunkto de la intereso;

la kongreso, aprobante la decidon de la Pariza Konferenco pri esperanto en la Moderna Vivo, kiu postulis la enkondukon de esperanto en la lernejojn, decidis siaflanke sin turni al ĉiuj registaroj de la mondo kun la peto kaj alvoko, ke ili bonvolu aliĝi al la Interŝtata Esperanto Akordo pri la deviga enkonduko de Esperanto en la lernejojn kaj ke ĉiu ŝtato donu promeson enkonduki instruadon de Esperanto, se almenaŭ entute ses ŝtatoj donus la saman promeson. La kongreso konsideros la proponatan de dro Czubyński Interŝtatan Akordon traktaton, kiel plej praktikan vojon por ĝeneraligi lernadon de Esperanto;

la kongreso rajtigas sian Lokan Organizan Komitaton funkcii kiel la Realiga Komitato de la Kongreso kaj komisias al ĝi informi la registarojn pri la laboroj kaj la rezolucioj de la Kongreso.

INTERŜTATA ESPERANTO AKORDO.

Cirkulero I.

Mallongigo: IEAk-movado.

Ĉefideo plejmallonge (24 vortoj): Ses ŝtatoj reciproke inter si promesas: „ni enkondukos esperanton devige en ĉiujn lernejojn de nia lando, se vi la saman ĉe vi promesos fari“.

Provizora ĉefgvidanto: dr Antoni Czubyński, WŁOCHY pod Warszawą, Wesoła, 22.

Varsoviaj rezolucioj akceptitaj dum plena kunsido de XXIX Universala Esperanto Kongreso 14 VIII 1937.

a) rezolucio de dro Antoni Czubyński por interna uzo de esperantistoj:

b) rezolucio por ekstera uzo propaganda:

Teksto de la Akordo (france) por subskribo al la ŝtatoj: proponata antaŭe per UEA kaj ICK:

Teksto por la plebisito: „(Nomo de asocio, persono k. t. pl.) subtenas ideon pri Interŝtata Esperanto Akordo“. Se necese por pligranda klareco aldonu 24-vortan mallongigon ĉi-supre cititan.

Literaturo pri IEAk-movado: a) en maja numero de ĝeneva „Esperanto“; b) artikolo en ĝeneva Ora Jarlibro de UEA por jaro 1937, paĝoj 185—203 kaj eldonita aparte kiel represajo dum varsovia kongreso; c) Ora Libro, paĝo 118 kaj sekv.

Ĉeforgano ankoraŭ ne ekzistas. Provizore la komunikoj de ĉefgvidanto estas sendotaj al: Heroldo de Esperanto, al ĉeforganoj de UEA kaj IEL, al Aŭstria Esperantisto ĉe Muzeo Esp. en Vieno. Naciaj esp. organoj bonvolu ilin ripeti.

Komunikoj de ĉefgvidanto: a) Oni petas naciajn komitatojn por la Realigo de IEAk sciigi nin pri taŭgaj agantoj, kiuj volus sin dediĉi al tiu ĉi grava movado organizante ĝin laŭ la direktivoj de rezolucio a. Estus dezirinde, ke tiuj ĉi samideanoj ne pritraktu tiun ĉi laboron kiel la alkroĉaĵo al iu alia, kvankam esperanta laboro, ĉar ili ne plenumos bone gravan taskon, kiun ili prenos sur siaj ŝultroj, sed dediĉu sin nur ekskluzive al IEAk-movado.

b) Se estas necese, libreto pri IEAk-movado disdonita dum varsovia XXIX kongreso povas esti represata parte aŭ entute, ĉar aŭtoro rezignas pro la bono de IEAk-movado pri la aŭtor-rajtoj. Nepre estas tamen sciigo de la aŭtoro pri eventuala eldono.

c) La raportojn pri la progreso de preparaj laboroj por IEAk-movado vi unue presu en viaj esp. naciaj organoj kaj poste sendu ilin al la ĉefgvidanto. Evitu malnecesajn korespondadon.

d) ĉefgvidanto ne respondas leterojn sen respondkupono.

Dr Antoni Czubyński.

ELIZA ORZESZKOWA.

Ĝa feliĉo — kie?

La bela, fiera, riĉa Caccilia Metella por enspiri la freŝecon de somera prospero ordonis la nigrajn Numidojn mallevi el la ŝultroj orumitan seĝportilon kaj suriris el ĝi la bazalte pavimitan Apian Vojon.

Tuj ĉirkaŭis ŝin brileleganta svarmo da amikoj kaj adorantoj; nenio nome pli honoriga, aŭ pli dezirinda estis en tiama Romo, ol la gastameco, amikeco, amo le fraŭlino heredonta la nomon kaj riĉaĵojn de granda Metella gento. Ne-

multaj ja estis tie videblaj tiel admirindaj aperaĵoj, kiel ĉirkaŭvolvitaj per broderita „stola“ la talio de tiu virino, kaj tiel allogaj, kiel ŝiaj, okuloj, kiuj per sia brilo kaj beleco superis juvelojn dissemitajn en artisteca diademo de ŝia ora hararo.

La elĝantant do iom el la purpuraj vualoj de la portseĝo surŝutis ŝoj — kaj respektplenaj bonvendiroy.

— La diino ektuŝis teron per zefira piedo! Benita ĉi tero! — entuziasme kaj humilklime vokis pliaĝema, sed koket-vestita kaj konsulardevena Rutilius Tersus.

Ne tiel altdevena, sed pli riĉa kaj pli juna Pomponius krucigis la manojn sur la brusto kaj mielokule elparolis:

— Kiomfoje mi estas vidanta vin, Domino, mia penso erarvasas pro la demando, ĉe kiu diino vi povas plej grave vekti envion: Dianon vi superkreskis per subluma figuro, Venuson vi estingigis per viaj ĉarmoj kaj Minervo...

Jus nun sprita flatisto kaj favorato de imperiestro Aŭgusto, Popeus, interrompis la parolon al patetikema Pomponius.

— La surteraj klaĉindaĵoj, ho Estiminda, estos eble pli agrablaj al Vi, ol la enĉielaj. Hieraŭ dum la vespermaĝo ĉe la tablo de roma kaj mondperiferia Imperiestro oni multe parolis pri Via nekomparebla sprito kaj Cezaro mem — li vivu eterne — eltrinkis tiom da vinpokalaj, kiom da literoj enhavas via nomo.

— Gloroga, granda, kara al Romanoj nomo! — aŭdigis instruita Blandus. Dalmacion kaj Numidion posedas Romo dank' al viaj antaŭuloj kaj ilia sango miksiĝis en viaj vejnoj kun la viviginta la plej estimandan sur tero genton de Scipionoj.

— El du do tiel brilaj trunkoj eligis mondmirindaĵo — aldonis fama, gaja Haberius kaj la plej juna, senĉuragaĝema, sed bela kiel Apollo, Lucius Manilius ĝemspiris kaj senfoliigante tencatan en la mano bukedon de rozoj li ŝutis sub ŝiaj piedojn iliajn odorantajn florfolietojn.

Kvazaŭ manplenon de diamantoj disŝutis Metella inter siajn adorantojn sennombron da pereemaj koketridoj kaj rigardoj, sed ŝia okulo sur neniu el ili haltis plezure aŭ amike nek ekbrilis en ŝi la feliĉosento. Eĉ pli, ĉirkaŭ ŝia korbaluŝo vagis moko, kiam etendante be-

lan manon kontraŭ okcidenta ĉielflanko ŝi aŭdigis:

— Ĉu vi havas eĉ ne unu admir — kaj raviĝesprimon, Domini, por tiu naturfenomeno, kiu montriĝas al vi en tiu brile malleviganta suno?

— Rigardante vian vizaĝon, ho plej radia, mi iĝas malvida je ĉiuj ĉiel — kaj terbriloj — deklamis Pomponius.

Aliaj ripetis la samon ŝanĝvorte, post kio mondsperta Haberius demandis Metella'n, ĉu ŝi pasigis agrable la tempon dum hieraŭa regalo ĉe konsulo Labea, la flatiso Popeus obtuzvoĉe komencis komuniki al ŝi la plej freŝajn klaĉaĵojn rondirantajn la kortegon kaj la urbon, en kio helpis lin malicspita, pliaĝema Tarsus, instruita Blandus petegis ŝin, bonvoli iĝi patronino de jus finskribita de li verko kaj la bela, tutjuna Manilius deklamis kantvoĉe la poemon verkitan por ŝia honorigo.

Tiamaniere tro malrapide kaj fiere pasante ili en aro amasigita, parolbrua, kostumbrila, parfumodoranta, sed nek el ŝia buŝo, favoran vorton, nek el la okulo feliĉvibron eligi ili povis. Guste eĉ, ju pli longe ŝi trovis sin en ilia ĉesto, des pli evidentaj ondoj de enuigo aŭ sopiro surfluis ŝian blankan, fiere levitan frunton, des pli for ien pli eniĝe sub la eternan ĉielvolbon ĝis la randojn de ebenaj riĉa je sankthoskoj penetris ŝia minacema kaj malgaja rigardo. Subite ne haltante ŝi komencis paroli:

— Multe pli, ol per glorado de miaj avantaĝoj, kiun mi estas aŭdiginta de post mia ekvivo, vi estus min ĝojigintaj, Domini, se vi volus solvi la enigmon turmentantan nuntempe mian penson.

Kaj kiam ili unuvoĉe kaj arde ŝin petegis, ke ŝi laŭeble tuj donu al ili la okazon iĝi amindaj al ŝi, ŝi ĵetis koncizan demandon: La feliĉo — kie?

Tuj elŝutiĝis el iliaj buŝoj la respondoj.

— En la eblo rigardadi vin!

— En tiel gaja kaj ĉiajn zorgojn malhavanta vivo, kiel via, vi favoratino de dioj kaj homoj!

— En la sango tiel nobla, kiel la pleniganta viajn noblajn vejnojn!

— En tia, kiel la via, famo, vi plej alloga el romanaj virinoj!

— En tia, kiel la via, riĉeco, ho here-dantino de Metellus Numidicus!

— En via amo, ho dia!

Tiujn respondojn aŭskultinte ŝi hal-

tis la unuan fojon kaj turnita al ili vizaĝe kun mokridoj, vibrantaj kaj ŝanceliĝantaj kiel akriĝitaj ponardoj sur tuta ŝia vizaĝo ŝi aŭdiĝis:

— Morgaŭ... aŭ ne, pro ĉiuj dioj! eĉ hodiaŭ mi venigos unu el plej kleraj juristoj romanaj kaj ĉe la fino de mia testamento mi igos skribi ordonon, ke... kiam mi estos mortinta, tie ĉi, sur ĉi-ĉi loko, estu konstruita al mi tomba monumento, kies formon mi ne estos montrinta — pro ĝi cerbumu la arkitekturoj — sed mi estos postulinta, ke sur la pinto ĉirkaŭ ĝin la figuroj de azenaj aŭ bovaj kapoj...

Per tiuj vortoj malĝojzinte siajn adorantojn, sed ne povinte ilin ofendi — kiu ja povus koleri kontraŭ tia, kiel ŝi, surtera diino — Metella etendis manon kontraŭ unu el disŝemitaj tra la valo sanktaj boskoj kaj iom pli gaje ŝi demandis:

— Kio jen okazas tiel gaja kaj solena sub tiuj multtagaj kverkoj? Mi aŭdas miksaĵon de voko kaj kantoj, mi vidas belvestitan amason da virinoj kaj geknaboj.

Unu el ŝiaj adorantoj malestime rediris:

— Ĝi estas eble plebejaro solenanta la feston de unu el siaj plebejaj dioj.

— Mi iros tien — ekvokis Metella. — Eble inter la plebejaro mi trovos ion por priklari aŭ priridi, ĉar delonge jam mi malkaŝe aŭ ŝtele nur — oŝcedas!

Ŝia kapricio estis por ili ordono! Do kun zorge kaŝita malemo ili forlasis laran kaj dum tiu tagmomento de eleganta societo frekventantaj vojon kaj sekvis ŝin sur kampvojoj kondukantaj tra la kampo al montrita de ŝi loko. Post la sekvantaro, alte super florantaj kakttoj kaj fondaĵaj buks- kaj mirt-bariloj, antaŭeniĝis orumita portego portata de kelkaj brunhaŭtaj Numidoj.

Inter multaj, por honorigo de diversrangaj dioj destinitaj boskoj ĉirkaŭantaj grandegan Romon, tiu apartenis al plej malgrandaj kaj malplej ornamitaj. Alie, ol en ceteraj, malestis en ĝi spacemaj, sekrethavaj ejoj, multvaloraj portikoj kaj temploj, aŭ amaso da majstre ĉizitaj statuoj, aŭ bedoj de plej maloftaj, odorebriigaj plantoj. Neniu, ol kelkaj nur antaŭepokaj kverkoj, eble tiom, kiel la Romo, aĝaj kaj per siaj kunigitaj branĉoj formantaj kavvolbon, sub tiu sur postamento krude el simola ŝtono elhakita levigis nur unu, aĝa eble kiel tiuj kverkoj, krude per malmoligim-

taj supoze manoj ĉizita statuo de virino. Neniaj artaĵoj aŭ ornamoj, nur fontelo, kiu el mola herbotapiŝo elŝprucante tordigis argentradie apud kolosaj kverkotrunkoj; neniaj riĉaĵoj, nur senĉese ŝanĝiĝantaj kaj moviĝemaj, jen kontraŭ la kamparo kaj urbo forfluantaj, ĵea de ili atencitaj homamasoj solene, sed vulgare vestitaj kun preĝantaj kaj ekstazojtenaj, sed vulgaraj vizaĝoj. Ĝi estis grupoj de vilaĝanoj, kiujn ia solena kaj ĝisfunde ilin kortuŝanta festo ferŝuis de ĉiutagaj pezaj laboroj kaj zorgej Simplejn ankaŭ, malkarajn, matriĉajn ili alportadis tien oferaĵojn: la kronojn el arbaraj kaj surkampaj floroj, la korbojn plenajn da odoranta rosmareno, avendanoj, krucoj kun lakto kaj fluida mielo. Formante el la kronoj ĉirkaŭ la statuo kolorajn, hirtajn, pro berbo, sovaĝan odoron spiregantajn amasojn kaj sub ĝiaj piedojn ŝutante rosmarenbranĉojn kaj el la argilĉerpujoj blankajn aŭ orkolorajn fludajojn elverŝante la maljunuloj, la viroj, la junuloj, la virinoj en unu granda floro, el kiu eliĝis kaj melodie plendkautante vaste dissonadis la plej ravi-taj kaj preĝantaj voĉoj, vokis:

— Anna Perenna! Anna Perenna! Vi kompatulino de malfeliĉa popolo, vi patrino nutristino, estu benata! Anna Perenna, vi kun virina koro kaj vira saĝe, kun kolomba dolĉo, leona kuraĝo, kun agopretaj manoj, kun rapida piedo, modesta buŝo, fajrīga parolo, estu benata! Anna Perenna, vi virino super virinoj, dank' al kiu la bonaĵojn de vivo ni ĝuas, estu benata!

Kaj ĉiam, kiel strofo de neĉesanta himno, kiel gvidilo de la ĉiutaga ĉiudodiĝo, tiu virina kaj plebeja nomo dissonadis inter la antaŭtempaj kverkoj kaj multe diskuradis tra la kampoj. Nenia dio estis iam pli laŭle, kortuŝe, triumfe odorata, ol tiu morteculino, kies memoron tiuj simplulaj aroj hodiaŭ festis. Tuj, preskaŭ tuj ĉe la piedoj de fieraj, skultajriĉaj, per marmoro kaj oro ornamitaj palacoj, en kiuj estis glorata kaj estris Caccilia Metella, ili festis ame, dankinde kaj honorige la memoron kaj gloron de Anna Perenna.

Maljunulon ŝtrantan iom flanke ĉe la kverkoradikoj rekonsciigis el meditado la demando eldirita per voĉo fierparolo kaj ordonkutima.

— Kiu do estis jena-ĉi junulino, kies al neniu konatan nomon vi tiel glori-

gas? Kiu devene ŝi estis? Kion ĉiam laŭdindan ŝi povis esti farinta?

La maljunulo levis la palpebrumojn kaj ekvidis antaŭ si virinon, pli ĝuste al koleriĝinta diino, ol al mortemulino similan. La pasia laŭdhomagio oferata al alia, ol ŝi, virino, incitis Caecilian Metellan; la sinceraj, enfundaj sentoj, traigantaj la plebejaron por tiu-ĉi nekonaŭta vekis en ŝi nekomprenatan, sed ĉagrenigan bedaŭrenvion. Tial do ŝiaj fieraj flariloj blovŝveliĝis pasie, el la okuloj eliĝis flamo kaj la juveloj super la altenlevita frunto kaj koloraj brode-raj volvantaj la regulinan talion tremis, vibris, ardis en la sunluma strio, en kiu ili antaŭ la maljunulo estis starigintaj. Li tamen nek timon, ne miron eksentis. Lia okupo estis malsarĝigi la ŝipojn venantajn de la maro sur Tibero kaj transportadi la komercaĵojn al riĉaj vendejoj de la ĉelurbo, li konis do bone ĝiajn loĝantojn kaj nun kapuminte ĝentile li respondis:

— Estu salutata, vi clarissima; mi vin ekkonas, vi estas filino de Metellus Numidicus, plej riĉa sinjorino en Romo. Kiuj do dioj alkondukis vin en lokon vizitalan nur de mizera popolo? Vi ne scias, kiu estis Anna Perenna kaj per kio ŝi akiris senmortan gloron? Ne mirinde! La filinoj de konsularaj romaj gentoj sidigis sur neatingeblaj okule altejoj kaj ankoraŭ neniu dio estas eliginta tian radion, laŭ kiu iliaj animoj estus malsupreniĝontaj al ni. Tion unu mi tamen ne komprenas, pro kio vi estas veninta ĉi-tien kaj kial vi min demandas pri la afero tute vin ne tuŝanta. La historio estas longa kaj ĝis kiam mi estos ĝin rakontinta, eble ia luksa regalo, ho clarissima, malgaje troviĝos sen vi, kiel tago sen suno.

— Ne domaĝas, rakontu ĝin! Ci estas aroganta kaj alian fojon mi estus eĉ severe admoninta! Nune tamen rakontu, mi ordonas!

El la ombro de kverkaj interplektaĵoj, en kiu vidiĝis vigla figuro kaj lakto-blankaj haroj de maljunulo, ekmurmuris mallaŭta rido akompanata de vortoj:

— Ho clarissima! Kiel vi malsimilas Anna'n Perenna'n, kiel malsimilas! Ŝia historio vin ekinteresos tuteerte, ĉar ĉiam estas interesege sciigi pri io tiel al ni malsimila, kiel vi, ho clarissima, estas malsimila al Anna Perenna... kvazaŭ ŝin kaj vin, ho clarissima, tute a-

liaj dioj estus kreintaj... kvazaŭ ŝia kaj via animo, kiel du krucoj de malsama valoro kaj formo, tute per alia vivvino estus plenigitaj... Sed tamen konsentite! konsentite! Mi parolos, se vi ordonas... kaj kial ja mi ne estus faronta, pro Kastoro kaj Pollukso, tian neatentindan servon al filino de konsulara familio!

Largajn ŝuldrojn li iom ĝibkurbigis, ambaŭ manojn, kiuj pro laborado surpronis aspekton de nigremaj kaj torditaj branĉoj, apogis sur dika bastonĉo kaj komencis paroli:

— Okazis tio frutempo, multe pli frue, ol la familio de Metelloj sufiĉas devene Konton kompatanda roma popolo la venĝo de Jupitero malligis la Fienon de malsato. Kial venĝis Jupitero la malriĉan popolon? Ĉu pro ĝia humileco kaj humiligo? Ĉu pro tiuj varmegaj ŝvitstrioj, per kiuj ĝi la nerevanĉeman glebon aspergis? Ĉu pro malmoligo de laboraciĝintaj manoj, ĉu pro la ĉiam larmoplena koro? Neniu povis diveni, sed ĉiuj sentis, ke ili suferas kaj pereas. Vane mi estus pentranta antaŭ ti, ho konsulargenta filino, la turmentojn de malsato; vi ne estus komprenonta eĉ la plej ioman ĝian komencon, vi, kiu opinias domaĝo, se la kuirmajstro submetos al vi nesufiĉe grasan pavidon aŭ ne tre abunde pro aleksandria saŭco surverŝitan marfiŝon. Ili deziregis sekale — kaj avenfarunajn flanojn simile, kiel vi novas soifi eble nur la dian nektaron ĉar la surterajn nektarojn vi triukas tiel longe kaj seĉese, ke naŭza je la palato vi demandas la subon de via vokalo: La feliĉo — kie?...

La virino simila al tera diino ĉifonigante nun kaj en blankaj kaj pro diamantoj brilantaj fingroj ĉifante la riĉajn pendekstremaĵojn de ĉirkaŭzonanta ŝin rubando aŭdigiis:

— Akra estas ĉia parolo, ĉi maljunulo, sed saĝa. La ĉiutage leviĝanta suno tiun ĉi demandon sur fundo de mia animo lumigas kaj ĉe la regalaj lampoj ĝiaj vortoj ne estingiĝos... ste eĉ des pli traige bruldolorigas... Parolu pluen, parolu plu! Akra estas ĉia parolo, sed saĝa.

— Okazis tio frutempo, multe pli frue, ol la familio de Metelloj sufiĉas devene, sed ekzistis eĉ tiam similaj al ĝi laŭ potenco kaj riĉaĵoj familioj. Ili ne suferis malsaton, ĉar por ili ĉiutage el Sicilio, el Afriko, el grekaj insuloj kaj

azia bordo alvenadis ŝipoj ŝarĝitaj je frandaĵoj kaj neniam inter ili simile. kiel ĵus tiam, daŭris tiel sincera kaj bruema gajece. La antikva kroniko heredigis al ni la sciigon pri Saturnaliaj, kiuj okazis tian kun neaŭdita antaŭe lukso de festenoj kaj regaloj. Sur Janikulo, en Suburo, en ĉetiberaj antaŭurboj la homoj kiel bluaspektaj fantomoj ŝanceliĝis, sveniĝis, pereis... La regalo, per kiu Quinctius Valerius estis soleniginta siar, edziĝon kostis 50.000 sestercojn kaj dum ĝi oni regaldis cent plej malsamajn manĝaĵojn kaj santoniojn da vino-specoj. Sur Janikulo, en Suburo, en ĉetiberaj antaŭurboj la homoj kiel bluaspektaj fantomoj ŝanceliĝis, sveniĝis, pereis... Claudia Flavia, Pomponia Atia kaj aliaj mendis al si la vestaĵojn el Mileto, perlojn el Korinto. Sur Janikulo, en Suburo, en ĉetiberaj antaŭurboj la homoj kiel bluaspektaj fantomoj ŝanceliĝis, sveniĝis, pereis. En palatina teatro ludis plej fama citaristo kaj la aŭskultantoj ravitaj de lia ludarto ĉirkaŭzatis lian citaron per diamantsnuro, dum en la gorgon oni enverŝis al li tiom da plej kosta el grekaj vinoj, ĝis la kompatindulo ebriiĝis kaj longe poste ne estis kapabla ludi. Supratavole bruis, dancis, drinkis la Saturnaliaj: sube en unu ĉetibera kabano Anna Perenna matene post profeta sonĝo ellitiĝis kaj diris: „Kiam mi tian sonĝon indis, do mi igos ĝin reala“. Ŝi sonĝis, ke ŝi estis savinta la popolon antaŭ la malsathienio...

— Kiu ŝi estis, ĉi malĵumulo? diru tuj, kiu ŝi?

— Neniu granda, ho clariŝsima, neniu granla... Fi, viaj mostaj oreloj pardonu al mi, ŝi estis bakistino, la tutan vivon ŝi bakis aven- kaj sealfarunan panon kaj havis pro tio provizon da faruno... Ŝi kolektis do lignojn, eligis fajron, alportis akvon kaj komencis knedi kaj baki panon kaj kiam ŝi estis bakinta, tuj vigla kiel cervino ŝi disportadis ĝin inter la malsatantojn. Ŝi urĝis, urĝis! La ŝvito surverŝis ŝian frunto kaj suferiga doloro traŝiris lacigintajn mentojn, sed ŝi ne ripozis, leporsole endormiĝante, kiam en la nigra noktmanetelo foriĝis grizaj ombroj, matenkrepuske ŝi leviĝis kaj ree lignopecojn ŝi pretigiĝis, flamon eligis, knedis, bakis... Ĝis unu tagon pro malespero ŝi manklakis..., sub maldika tavolo de faruno ŝi ekvidis malmolan, lignan fun-

don de siaj bareloj. Ĉu per tiu malmola ligno ŝi povos plu nutri la malsatulojn? Ĉu la profeta sonĝo ŝirigiĝos duonvoje — neplenumita? Ne; ŝi elkuris fajre el sia kabano kaj estis vidata enpenetri portata de dia ventego Palatilon, portikon post portiko, palacon post palaco rapidante ĉien, kie nur ŝi rimarkis togojn pro purpuro kaj stolojn pro oro brilantajn, streĉante siajn nigriĝintajn manojn kaj sian antaŭtukon. Tie ŝin vidante unuj pro rido lumbumis, aliaj kriis al sia servistaro: „Forpelu tiun azeninon“, kelkiuj ekvidinte ŝin el fore agacmienis kvazaŭ enlutinte vinagron, sed estis ankaŭ permesantaj, ke ŝi el la balaĵujo kolektu la forĵetaĵojn de iliaj regalmanĝoj kaj Quinctius Valerius aŭskultinte ŝian parolon pro profunda meditiĝo igis doni al ŝi tiom da farunmankvantoj, kiom da menueroj estis dum lia edziĝa regalo kaj Claudia Flavia el sia ŝnuro de korintaj perloj enĵetis unu en ŝian antaŭtukon. Mi neŝcias, kion Anna Perenna estis faranta sur tiuj luksoj montaroj, kio okazis kun ŝi kaj kiajn miraklojn aŭ sorĉojn ŝi plenumis, la antikva kroniko enhavas nur, ke ŝi havis ŝultrojn sangemajn pro servistaj vipoj kaj ĉiel skurĝitan animon, sed manojn kaj antaŭtukon plenajn. Leporsobre endormiĝinte ŝi leviĝadis ree matenfrue, elitis lignerojn, eligis fajron, knedis, bakis kaj la bakajojn ŝi vigla kiel cervino disportadis inter la malsatulojn, ke fine ruĝemaj strioj el ŝia mano eniĝis en paligintajn vejnojn de viroj kaj virinoj kaj la etaj infanoj kiel pro varmege velkiĝintaj floroj ree ekfloris. Daŭris tio longe. Fine el alta ĉielo venis hela, bona, fruktoporta printempo kaj Jupitero pro ĝiaj bridoj foren tiris el la mondo la malsathienon. Ne al Jupitero tamen la unua oferis la popolo dankdonojn, sed grandamase ĝi ĉirkaŭis la bakejkabanon. „Anna Perenna! — oni vokis el ĉie — vi kompativa por mizera popolo, patrin' nutristino, estu benata! Anna Perenna kun virina koro kaj rapidaj piedoj, kun modesta buŝo kaj fajreca parolo, Anna Perenna, dank' al kiu ni ĝuas la bonajojn de vivo, estu benata!“ Sed antaŭ glorigantan ŝin popolon ŝi eliris laciginta kaj kvieti: „Via servistino mi estas — ŝi diris — kaj mi faris, kion al mi mia profeta sonĝo fari ordonis. Nune mi volonte el tiu ĉi mondo foriros, ĉar mi estis jam ĉe la pinto de ĝia feliĉo kaj nenion pli bonan, ol kion mi estas ĝuinta, akiri mi povas“. Inter

tiujn ĉi kverkojn ŝi foriris kaj en ilia ombro ripozinte en dia ekstazo ŝi disigis de la vivo kaj la dankema popolo fondinte al ŝi la statuon tie ĉi depost pratempoj kaj nekalkuleblaj generacioj unu tagon al ŝia memoro dediĉas.

En densa ombro de kverko la voĉo de nevidebla jam preskaŭ rakontisto silentiĝis. La vespera krepusko estingis la brilojn de juveloj kaj broderajoj ornamantaj Caecilian Metellan — sed kio do igis, ke ŝia frunto kliniĝis malsupren, la manoj svene defalis kaj lula reĝmajesta figuro — malgrandiĝis?

En profunda ombro de kverkoj mallaŭtigema voĉo de maljunulo aŭdigis ankoraŭ:

— Vi ne estis koniata tiun ĉi historion, ho clarissima? Pro dioj! Kiel vi povus ĝin koni! La kroniko ĝin tradiciiginta — jen la popola memoro kaj la amo, en kiu Anna Perenna estingiĝis, jen la mondanimio. Sed la konsularaj filinoj ne legas ja tiun kronikon kaj tian animon en la brusto ne enhavas. Eble nur pro tio enviante al dioj nur ilian ambrozion sur la fundon de sia pokalo fiksrigardantaj ili legas sur ĝi la demandon: „La feliĉo — kie?“

Ŝi ankoraŭ nenion diris; eble fiksrigardinte sian vivpokalon ŝi silentis. Sed tuj ŝi levis rapide la kapon kaj streĉita, tremanta, al uragano simila ŝi aŭdigis:

DU FAMAJ POLAJ VERKISTINOJ

POLA GOJAWICZYŃSKA KAJ IRENA KRZYWICKA PRI ESPERANTO

La ideo eldonadi naciajn antologiojn en Esperanto estas ege valora por la propagando de nia lingvo en la respektivaj landoj.

La laste eldonitaj antologioj, sveda, hungara, ĉeĥoslovaka, kaj la eho, kiun ĉiu el ili elvokis en sia lando, pruvas, ke tiu propagando-rimedo estas nepre imitinda, malgraŭ, ke ĝi postulas multan monon kaj multegan laboron. Speciale substrekinda estas la merito de nia plej grava eldonejo esperanta, „Literatura Mondo“, kiu post la eldono de la unuaj, prenis je si la taskon eldonadi pluajn antologiojn de naciaj literaturoj. La plej nova, kiu nun estas preparata por eldono, estas antologio de la pola literaturo.

Guste tio estas la kaŭzo, ke mi devis fari kelkajn intervjuojn pri Esperanto kun eminentaj polaj verkistoj.

La redaktanto de la pola antologio sin turnis al mi kun propono traduki ion el la pola literaturo por la antologio.

— He, miaj Numidoj!

Tiam do la fidelaj adorantoj ĉirkaŭis ŝin ree per belvesta kaj voĉlaŭta, subingema kaj ŝercema rondo. Sed ŝi trairis inter ili kun sulkigita brovo kaj paliginta frunto kaj malaperis el antaŭ iliaj okuloj inter purpuraj kurtenoj de portseĝo.

Sur malhelaj ŝultroj de Numidoj portata ŝoviĝis la seĝo en krepuska aĉero super florantaj kaktovicoj kaj malaltaj buksobariloj. La fidelaj adorantoj ne ĉesis ŝin ĉirkaŭi proksime, malgajigintaj pro la malapero, konsolataj per espero esti vidontaj ankoraŭ la surteran diinon. Plej kuraga kaj plej frue malpacienĉinta Poppaeus per elasta gesto de kortegelegantulo devualinte iom la kurtenojn enigis la scieman rigardon en la internon de portseĝo kaj kiam li estis ree returninta la okulojn kontraŭ la akompanantuloj, pentriĝis sur lia vizaĝo senlima miriĝo.

Kion li estis vidinta? Ho doj, kion li estis vidinta! Jen ja kurioza klaĉindajo, kiun li ankoraŭ ĉi-tage estas disportonta tra ĉiuj palacoj! Kun diamantoj disŝutitaj kiel senvalora sablo ĉe ŝiaj piedoj, kun ŝiritaj haroj, kun vizaĝo en la manoj, la bela, riĉa, fiera, adorata Caecilia Metella — ploris.

Tradukis Józef Orzech.

Mi elektis kelkajn nomojn kaj devis ricevi de ili aŭtorajn rajtojn por traduko. Mi konfesas, ke mi ne estis tute certa pri la sukceso de miaj provoj; bedaŭrinde, post 50 jaroj, Esperanto ne estas sufiĉe populara kaj komprenita en Polujo, kvazaŭ por pruvĵi la proverbon, ke neniu estas profeto en sia lando...

Unue mi telefonis al sinjorino Gojawiczyńska (elparolu: Gojaviĉinska) kaj ŝi fiksis daton, kiam mi povos ŝin viziti.

Akurate je la 6. horo de la fiksitaj tago mi sonorigis ĉe ŝia pordo.

Malfermis la pordon bela, ĉirkaŭ 19. jara fraŭlino, kiun mi opiniis la verkistino mem. Tute la sama, kiun mi bone memoris laŭ multfoje viditaj fotoj. Sed kiel juna ŝi aspektas, — mi pensis, kaj mi ekmiris, kiam tiu junulino respondis al mi, ke sinjorino Gojawiczyńska ĵus telefonis, ke mi atendu kelkajn minutojn, ŝi venos baldaŭ.

Mi tamen ne eraris multe, — la simi-

filino estas ne iu alia nur filino de la verkistino... Tute certe, antaŭ 19 aŭ 20 jaroj. Pola Gojawiczyńska aspektis kiel ŝia filino nun. — — —

Ne longe mi povis observi la bildojn kaj portretojn en la „metiejo“, kie laste naskiĝis la bonegaj romanoj de Gojawiczyńska. „Knabinoj el strato Nowolipki“, „La paradiza pomujo“ k. a., kiam ŝlosilo ekgrincigis la seruron de la pordo kaj post momento mi ekaŭdis el la antaŭĉambro demandon: „Kial tiom silente estas tie ĉi?“ „Ĉu estas tie neniu?“

Por doni signon, ke iu estas tie ĉi, mi delikate ekŝovis la seĝon, kaj post momento aperis en la pordo la verkistino.

Iometa habilado pri „ĉio kaj nenio“ kaj ni aliris al la temo.

— Kun plezuro — ŝi diris —, mi donos permeson traduki ion el miaj verkaĵoj en la esperantan lingvon. Iam — daŭrigis sinjorino Gojawiczyńska — mi interesiĝis pri Esperanto, mi eĉ konas ankoraŭ iom da gramatikaj reguloj kaj vortoj.

Sinjorino Gojawiczyńska konsideras nian lingvon kiel tute fatiga kaj nepre bezona ilo en la internaciaj terrilatoj. Mi nur estis iom embarasita, kiam mi devis respondi ŝian demandon, kial Esperanto ne estas pli multe disvastigita en Polujo.

Konvinkita pri vera simpatio de la verkistino al nia movado, mi adiaŭis ŝin, promesante refojan viziton kun volumo de la pola antologio en Esperanto. Mi esperas, ke tiun viziton mi povos fari nur post ne longa tempo. — — —

Hazarde okazis, ke ankaŭ la duan vizi-

ton mi devis fari ĉe sinjorino, tre populara pola verkistino, Irena Krzywicka (elparolu: Kŝivicka). Krzywicka estas tipo de moderna virino, kaj tian tipon ŝi ankaŭ prezentas en la nuntempa pola literaturo. Ŝia verkista laboro estas ĉefe dediĉita al la modernigo, samvalorigo kaj samrajtigo de la virino kun la viro.

Ŝiaj ĉefaj verkaĵoj estas noveloj, en kiuj ŝi montris grandan verkistan talenton. Por esperantigo kaj publikigo en la pola antologio mi ankaŭ elektis ŝian novelon kun tre interesa enhavo kaj kiu samtempe donas bonan provon pri la verkista kuraĝo kaj certeco de la verkistino.

Sed la rilato de ŝino Krzywicka al Esperanto tute surprizis min kaj superis miajn plej kuraĝajn esperojn tiurilate.

Ŝino Krzywicka estas entuziasmulino de Esperanto. Ŝi konfesis kun ioma ĝeno, ke kelkajn fojojn ŝi provis lerni la lingvon, sed ĉiufoje mankis la konvena tempo, aŭ io alia subite malhelpis.

— Sed pri unu mi povas vin certigi, sinjoro redaktoro — diris sinjorino Krzywicka — mian filon mi certe igos lerni la lingvon, kiu sendube fariĝos grava faktoro en la internaciaj rilatoj, en ĉiuj medioj de la vivo. Estas domaĝe — kontinuis sinjorino Krzywicka —, ke lia kultura valorajo kiel Esperanto, ne trovis ankoraŭ merititan aprobon. — —

La interparolo kun Sinjorino Krzywicka pri Esperanto montris al mi refoje, ke ni esperantistoj batalas por justa kaj nobla celo, kiu devas venki kaj venkos.

Henryk Glielb.

PRI LA KRIPLIGADO DE POLAJ GEOGRAFIAJ NOMOJ

Korekte skribita nomo de naskiĝurbo de dro Zamenhof estas BIALYSTOK. Ni tamen trovas ĝin bedaŭrinde kelkfoje kripligitan. En japana lernolibro estas nomata Bielostok, kio estas ankoraŭ travivaĵo de rusa nomo en rusaj tempoj. Sed dum polaj tempoj nia ĉefdelegito uzas malnecese la formon Białystok, aŭ eĉ Bialistok, mi ne scias kial? Certe, la fremdaj samideanoj ne elparolos korekte literojn I kaj Y. Sed el tio ĉi tute ne sekvas, ke oni kripligu por ili la nomon kiel oni malnecese kripligis Czestochowa en Censtohova. Des pli oni ne bezonas ŝanĝi Białystok je Bialistok, kiel tio ĉi okazis en Ora Libro 1937, paĝo 40. La francoj ne skribas esperante Okser, sed Auxerre, ne Bon, sed Beaune. Simile angloj ne skri-

bas Brajton, sed Brighton, ne Ĉorli, sed Chorley k. t. pl. Tute malnecese oni ŝanĝis Warszawa kaj Wisła je Varsovio kaj Vistulo. Mi preferus formojn, kiuj kiel eble malmulte malproksimiĝas de pola formo, sekve Varŝavo kaj Vislo. Sed, se tio ĉi jam unufoje okazis de dro Zamenhof mem, ni ne kripligu aliajn nomojn, sed konservu ilin en rekta ortografio, sekve Białystok, Czestochowa. Io alia okazas kun la nomo Łódź, kiu esperantigita povas esti nur Lodzo; sed kial ne konservi inter polaj kaj judaj samideanoj la elparoladon de unua litero, sekve Lodzo, lodzaj k. t. pl.? Ni do ne kripligu la nomojn, sed konservu ilin en korekta ortografio.

Dro Antoni Czubyński.

POLLANDA KRONIKO

BIALYSTOK. La Esp. movado en la naskiĝurbo de la Majstro laste tre revigliĝis. Antaŭ la Jubilea estis aranĝitaj de loka Zamenhofa Esp. S-to du kursoj: unu por loĝantaro de la urbo, gvidata de nia instruisto s-ro Doroŝko kaj dua por policanoj, gvidata de prez. red. Sapiro. La polican kurson, okazantan en la polica ejo, partoprenis 61 policanoj kun la urba polikomandanto s-ro Janasiński. La egzamenon antaŭ oficiala komisiono en ĉeesto de vojevoda polikomandanto Sztaba kaj viestaroŝto Myczkowski bone sukcesis 40 policanoj. Ili faris vigle sian servon dum la vizito de la kongresanoj en Białystok la 11-an de Aŭgusto. — La 16-an de Aŭgusto okazis en la megafona stacio de urba popola universitato en la urbaj aleoj en ĉeesto de pli ol 300 personoj prelego pri Svisujo de s-ro K. M. Liniger laŭ komisiono de svisa trafikministerio. La prelego, farita en Esperanto, estis ilustrata per belaj lumbildoj. Tradukis pollingve s-ro Sapiro. Poste s-ro Liniger prelegis vespere ankoraŭfoje en la ejo de la S-to. Post la prelego okazis honore al la gasto teovespero kun muzika programo kaj dancoj. — La 3-an de Sept. dum teovespero en la S-to s-ro Sapiro kaj f-ino Pomeranc raportis pri la Jubilea. — La 4-an de Sept. okazis en la Societo disdono de atestoj al la finintoj de la unua postkongresa kurso. Plej bone sukcesis kaj ricevis unuan premion s-ro A. Ciechanowski, duan premion — s-ro Murzan kaj f-ino Alkon. Novaj 2 grupoj da kursoj komencis studi sub gvido de s-ro Doroŝko.

LWÓW. Kursoj, gviditaj de Mgr. N. Kleinowa kaj Mgr. N. Herr finiĝis kun bona rezulto. Ambaŭ ricevis valorajn donacojn de siaj lernantoj. — Kurseton novan gvidas M. Mantel. Dank' al la klopodoj de nia fervora prezidanto s-ro J. Toczyński, ni ricevis valoran subtenon en la arango de Lwów' a postkongreso flanke de la urbestro kaj s-ro Kapitano Tot. Pregariĝas Esperanta eldono pri urbo Lwów, tradukata de Mińska Mantel.

WARSZAWA. — La 19. 4. 1937 okazis jarkunveno de Societo Turisma de Esperantistoj en Polujo — STEP. La raporto de la Estraro pri la agado de l' pasinta jaro konsistis el raportoj de la sekretariino, kasisto kaj Revizia Komisiono.

En la Estraron eniris: direktoro Bronisław Wyszynski — prezidanto, Eu-

genjusz Rytenberg — vicprezidanto, Halina Weinstein — sekretariino, Juliusz Zysman — kasisto, Aleksander Hartman, adv. Kazimierz Mamrot kaj Natan Rotman — estraranoj, Kiel anstataŭantoj: d-ro Maurycy Reichert, Tadeusz Szwajns kaj Julian Jarecki.

La Konsilantaro de STEP konsistas el: prof. Odo Bujwid, Leo Belmont, Eugenia Cense, konsilanto Leon Klimecki, d-ro Józef Krenicki, Stanisław Karolczyk, red. Stefan Lubliner, Juliusz Pomorski, d-ro Wilhelm Róbin, ing. Jan Skrzypiński, d-rino Zofia Zamenhof kaj konsilanto Kazimierz Zajęzkowski.

La Juĝantaro konsistas el: d-ro Ignacy Krenicki, mgr. Wanda Mamrot, adv. Leon Oberlender, starosta Jan Trzópek kaj Jan Fethke-Forge. Anstataŭantoj: Henryk Krawczyk kaj Aleksander Różanykwiat.

La kunveno estis sub signo de la Jubilea Kongreso en Varsovio. STEP, kiu de la 4. I. 1937 funkcias kiel Turisma Sekcio de la 29 Universal Jubilea Kongreso de Esperanto, laboris multe por sukceso de la Kongreso kaj zorgis pri la ekskursoj, loĝejoj, manĝaĵo ktp. Ĝi kunlaboras kun Pola Vojaĝoficejo „Orbis”.

Dank' al prof. Buiwid kaj multaj klopodoj de la prezidanto de STEP, direktoro Wyszynski, aperis jam la unuaj kvar broŝuroj-gvidlibroj pri Varsovio, Kraków, Wilno kaj Gdynia. La tradukon faris ĉino Halina Weinstein.

ADRESSANĜO.

Dro Antoni Czubyński loĝas nun en **Włochy** apud Warszawa, str. Wesola 32, m. 2.

UWAGA!

Wszelkie wpłaty abonamentu miesięcznika „Pola Esperantisto” skutecznie można na konto PKO Nr. 406.660 lub **przekazem rozrachunkowym, kartoteka Nr. 29**, co zaoszczędzi wpłacającym koszty przesyłki.

NI ATENTIGAS ĈIUJN NIAJN LEGANTOJN, KE NI ĈESIGAS LA SENDADON DE NIA REVUO AL ĈIUJ NEPAGINTOJ LA ABONON POR LA JARO 1937.



*En monato septembro
Ekferoras grupmembro.
Tm. indumas, aklamas,
Ĝed ĉu legi li amas?
Tĉi, dum liaj amuzoj
Malvategas la Muzoj?
Ĝe li legi ne amas
La fervoro ja lamas*

Katalogon petu de la
admin. de „Pola Esp.“

P E T O !

La **Hungarlanda Katolika Esperanto Societo** (leteradreso, Budapest, Petőfi Sándor u. 9. IV. 3.) eldonas ekde januaro 1937. dulingvan revuon: „**Katolik-usok Csillaga. Katolika Stelo**“, celante propagandan kaj informadon.

La redakcio petas la tutmondan katolikaron, bonvolu informi ĝin pri ĉiuj okazintaĵoj, kiuj taŭgas por interesi ankaŭ alilandajn katolikojn.

La redakcio kun danko akceptas artikoletojn (ĝis 1000 vortoj) pri nuraj katolikaj temoj.

La Esperanto-klubo en Norrahammar aranĝos Esperanto-ekspozicion en la fino de la monato septembro. Danke ricevas gazetojn broŝurojn p. k. k. l. p. Sendu al: Gerhard Nilsson, Dalsfors, Norrahammar, Svedujo.

ESPERANTO VENKAS!

Komunikajo de SCIENCA ESPERANTA RONDO en Bydgoszcz (Polujo).*

Antaŭ jaro nia Rondo aperigis en kelkaj esperantaj gazetoj artikoleton pri la plej fama kaj bela kuracloko KRYNICA, petante samideanojn, ke ili por propaganda celo postulu de la Direkcio detalajn informojn pri ĉi tiu kuracejo. Ĉar al Krynica venis pasintjare dekelkaj demandoj de diverslandaj samideanoj kaj krom tio ĉi tiun kuraclokon vizitis multaj eksterlandanoj (ankaŭ la nederlanda kronprincepino: JULIANA kaj BERNHARD) — la direktoro konsentis je nia helpo eldoni prospekton en la Esperanta lingvo, kio ĵus okazis.

Ĉiu partoprenanto en la Jubilea Kongreso ricevis ĝin kune kun aliaj kongresdokumentoj. Samideanoj, kiuj ne povis partopreni en la Kongreso kaj ŝatus ricevi ĝin senpage, bv. sin turni al Direkcio de Kuracejo (Ing. Leono Nowotarski) en K r y n i c a, petante lin pri la alsendo de la prospekto, kiu aperis jam laŭ informoj de esperantaj gazetoj.

Samideanoj skribu multnombre kaj montru, ke Esperanto vivas kaj taŭgas bone por turisma propagando. Danku ankaŭ al la Estraro de Kuracejo, ke ĝi eldonis tiel belan prospekton en la Esperanta lingvo! Kaj se vi havas pli multan monon kaj tempon, ne forgesu viziti Polujon somere aŭ vintre, kaj antaŭ ĉio ĉi tiun ĉarman kuraclokon!

Kun antaŭdanko por via grava servo kaj helpo samideane via

Prof. Sygnarski Mieczysław
prezidanto de S. E. R.
Bydgoszcz — Polujo.

* Ĉiuj E-gazetoj estas polataj represigi!

PRENUMERATA: rocznie zł. 8.—, półrocznie zł. 4.— Dla Towarzystw i grup esper. rocznie zł. 6.— Zagranicą: fr. szw. Numer pojedynczy zł. 0.70. podwójny zł. 1.40.

OGŁOSZENIA: 1/2 strony zł. 30.— 1/4 strony zł. 15.— 1/8 strony zł. 10.— Korespondencja: małe ogłosz. z 10 słów (prócz adresu) zł. 1.—

PRZEKAZ ROZRACHUNKOWY, KARTOTEKA NR.

ABONO: jare zł. 8.—, duonjare zł. 4.— Por societaj kaj grupaj esperantistaj jare zł. 6.— Eksterlande sv. fr. Aparta numero zł. 0.70 duobla zł. 1.40.

ANONCOJ: 1/2 paĝo zł. 30.— 1/4 paĝo zł. 15.— 1/8 paĝo zł. 10.— Korespondado: anonco de 10 vortoj (krom adreso) zł. 1.—

KONTO P. K. O. NR. 406.660.

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKÓW, LUBICZ 34.